OSTERREICHISCHE NATIONALBIBLIOTHEK
702348-C

# DUA PROPONO AL LA AKADEMIO ESPERANTISTA

de ANTIDO

En Aprilo 1911, la Akademio Esperantista aprobis *principe* la teorion de Antido koncerne la vortformadon en Esperanto, sed ĝi aldonis, ke tiu teorio ne ankoraŭ estas sufiĉe perfekta por esti aprobita en sia tuteco, kaj ĝi decidis starigi specialan komision por restudi la demandon pri vortformado, uzante la teorion de Antido kiel bazon por la diskutado.

Depost tiu epoko mi ne ĉesis pripensi la aferon kaj atenti ĉiujn kritikojn faritajn al mia teorio de diversaj kompetentuloj kiel S^roj Ĉefeĉ, Couturat, Zarkrewsky, Panel, kaj kelkaj akademianoj, kaj mi alvenis al la konvinko, ke la teorio de Antido povas facile esti plisimpligata. En la origina teorio unu el la ĉefaj punktoj estis la principo de la *specifeco* de la radikoj, principo laŭ kiu ĉiu radiko devas esti klasata, unufoje por ĉiam, ĉu kiel adjektiva (ekz. *bel, bon,* ktp.), ĉu kiel verba (ekz. *skrib, aĉet,* ktp.), ĉu kiel substantiva (ekz. *hom, teori,* ktp.). Tiu klasado estis proponita de S^ro Boirac jam en 1907.

Nu, la principo de la specifeco de la radikoj estas nepre necesa por precize fiksi la sencon de multaj vortoj; sen tiu principo oni ne povas scii, ĉu *grando* signifas « eco grand » aŭ « aĵo *grand* », ĉu *broso* signifas « ago *bros* » aŭ « aĵo, ilo *bros* ». Sed kvankam konservante la principon de la specifeco, oni povas proponi diversajn manierojn klasi la radikojn[1], kaj mi fine alvenis al la konkludo, ke anstataŭ konsideri la radikojn kiel adjektivaj, verbaj kaj substantivaj, sufiĉas klasi ilin kiel « konkretaj » kaj « abstraktaj. » Tio estas vera simpligo, ĉar tiel oni bezonas nur 2 klasojn anstataŭ 3. Kaj efektive, se oni klasas radikojn *grand* kaj *bros* kiel « konkretaj », *grando* signifas « aĵo *grand* » kaj *broso* signifas « aĵo, ilo *bros* »; kontraŭe, se oni klasas *grand* kaj *bros* kiel « abstraktaj », *grando* signifas « abstrakto *grand* » (proksimume « eco grand »), kaj *broso* signifas « abstrakto bros » (proksimume « ago bros[2] »).

Post kiam mi alvenis al tiu rezulto, mi konstatis kun surprizo, ke tiu nova klasado estis precize la sama, kiun proponis S^ro Ĉefeĉ en sia lasta verko pri vortformado en Esperanto. La sola diferenco estas, ke S^ro Ĉefeĉ klasis kiel « konkretaj » kelkajn radikojn, kiujn mi klasis kiel « abstraktaj » aŭ reciproke; sed tio estas nur detalaĵo, kiun la Akademio povos diskuti poste. La ĉefa afero estas, ke la sistemo Ĉefeĉ kaj la mia (kiuj komence ŝajnis tre malsamaj, eĉ kontraŭaj) estas ekvivalentaj unu je la alia kaj povas esti kunfandataj en unu saman sistemon. Kaj, ĉar S^ro Ĉefeĉ alprenis la klasadon « konkreta-abstrakta » antaŭ ol mi, mi nomos ĝin la *Ĉefeĉa klasado.*

Laŭ la Ĉefeĉa klasado, radiko kie *avar* ne plu estas radiko adjektiva (aŭ substantiva), sed radiko abstrakta (aŭ konkreta); do la adjektivo *avar-a* ne plus enhavas pleonasmon, kiel en origina sistemo Antido, ĉar sen la finaĵo *a* la radiko *avar* ne estas adjektivo per si mem, kiel en klasado Boirac.

Alia oportuneco de la klasado Ĉefeĉa estas, ke oni ne plu havas *bel* = *bel-a,* ĉar radiko *bel* ne plu estas klasata kiel « adjektiva »; do oni ne plu skribos, kiel en origina Antido : *bel-o* = *bel-a-o* = *bel-ec-o;* sed, ĉar radiko *bel* estos klasata kiel « abstrakta », oni havos kiel en la naturaj lingvoj :

*belo* = abstrakto *bel* = F. *le beau* = G. *das Schœne*
*beleco* = kvalito *bel* = F. *beauté* = G. *Schœnheit.*

Kvankam proksimaj unu al alia, tiuj du sencoj ne estas la samaj : *belo* estas ideo pli ĝenerala ol *beleco*, ĉar ĉiuj « ecoj » estas « abstraktoj », sed ne ĉiuj « abstraktoj » estas « ecoj ». Simile oni ne plu havos : *skrib* = *skrib-i*, ĉar radiko *skrib* estos klasata ne kiel « verba » sed kiel « abstrakta »; do, anstataŭ havi : *skrib-o* = *skrib-i-o* = *skrib-ad-o*, oni havos :

*skribo* = abstrakto *skrib* (ekz. *skribarto, skribmaniero)*
*skribado* = ago *skrib.*

---

[1] Mi jam montris, ke la sistemo Antido, kiu estas nur ĝenerala metodo de analizo kaj de sintezo, estas nedependa de la maniero, laŭ kiu oni subdividas la ideojn.

[2] S^ro Couturat ankaŭ proponis klasi la radikojn laŭ du kategorioj : radikoj « verbaj » kaj radikoj « nomaj », sed tiu klasado ne taŭgas; ĝi ebligas la distingon inter « ago bros » (verba) kaj « ilo bros » (noma), sed ĝi ne ebligas la distingon inter « aĵo grand » kaj « eco grand », ĉar ambaŭ tiuj ideoj estas « nomaj », kaj pro tio S^ro C. estis devigata starigi specialan regulon de derivado por fiksi la sencon de la vortoj kiel *grando.*

702348-C. Esp

Fine estas interese rimarki, ke per la klasado Ĉefeĉa la teorio de Antido pliproksimiĝas ankaŭ al la sistemo de S[ro] Couturat. Oni legas efektive en la raporto de la Komitato de l'Delegitaro : « Estu ideo konkreta, kiel *blind*; se por fari el ĝi adjektivon sufiĉas aldoni *a* kaj por fari substantivon samsencan (t. e. konkretan), sufiĉas aldoni *o*, por derivi el ĝi substantivon abstraktan, kiu havas alian sencon, oni devas aldoni sufikson *ec* : *blindeco*. » Nu, kiam S[ro] Couturat diras : « Estu ideo konkreta, kiel *blind* », li konsideras la radikojn kiel « konkretaj » aŭ « abstraktaj » kiel S[ro] Ĉefeĉ[1]. Li nur forgesas, ke radiko *blind* ne estas konkreta per si mem, sed per arbitra klasado. Efektive, S[ro] Couturat mem akceptas, ke al la ideo *blind* kunrespondas du substantivoj, unu konkreta, la alia abstrakta ; oni povas do, ĉu derivi la substantivon abstraktan de la substantivo konkreta (ekz. *broso, brosado*), ĉu inverse derivi la substantivon konkretan de la substantivo abstrakta (ekz. *broso, brosilo*). Oni rajtas do alpreni iun ajn el la du solvoj :

Estu radiko konkreta kiel *grand;* se por fari el ĝi adjektivon, sufiĉas aldoni *a*, kaj por fari substantivon samsencan (t. e. konkretan), sufiĉas aldoni *o*, por derivi el ĝi substantivon abstraktan, kiu havas alian sencon, oni devas aldoni sufikson *ec : grandeco*.

Estu radiko abstrakta kiel *grand;* se por fari el ĝi adjektivon, sufiĉas aldoni *a*, kaj por fari substantivon samsencan (t.e. abstraktan), sufiĉas aldoni *o*, por derivi el ĝi substantivon konkretan, kiu havas alian sencon, oni devas aldoni sufikson *aĵ : grandaĵo*.

Ambaŭ solvoj estas ĝustaj, kaj nur per arbitra decido oni povos decidi ĉu radiko *grand* estos konkreta aŭ abstrakta. En la unua okazo, oni diros *grando* (aĵo grand) kaj *grandeco* ; en la dua : *grandaĵo, grando* (eco grand), same kiel oni povus diri, ĉu *forko, forkego* (kiel en Esperanto), ĉu *forketo, forko* (kiel en Franca lingvo).

Resume mi nun havas la honoron proponi al la Akademio la jenan sistemon ANTIDO-ĈEFEĈ, kiel perfektigon de la sistemo ANTIDO :

# LOGIKAJ PRINCIPOJ DE VORTFORMADO

## En Esperanto

La vortformado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur tiel nomitaj « reguloj de derivado ». Reguloj de derivado malutilus la lingvon agante kontraŭ ĝia normala funkciado.

Vortoj povas enteni trispecajn elementojn : radikoj, prefiksoj kaj sufiksoj.

La finaĵoj gramatikaj estas ankaŭ kvazaŭsufiksoj :

Finaĵo **o** = *ideo substantiva*, t. e. ideo de **io, kio estas, ekzistas**, aŭ de **estaĵo** (ĉu **reala, konkreta**, ĉu **idea, abstrakta**).

Finaĵo **a** = *ideo adjektiva*, t. e. **kvalit**-iga **(ec)** aŭ **rilat**-iga **(propr)**.

Finaĵo **i** = *ideo verba* **(ad)**, t. e. **ag**-a aŭ **stat**-a.

Finaĵo **e** = *ideo adverba*, t. e. **manier**-a.

La vortoj unuelementaj estas nomataj *simplaj vortoj*; la vortojn plurelementajn oni nomas *kunmetitaj vortoj*. Por konstrui vorton kunmetitan, sufiĉas apliki la jenajn principojn :

1. PRINCIPO DE NECESO : *En konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn elementojn* (prefiksoj, radikoj kaj sufiksoj) *necesajn por elvoki plene kaj klare la ideon reprezentotan.*

2. PRINCIPO DE SUFIĈO : *Oni ne devas* (sen neceseco) *ripeti dufoje la saman ideon en la sama vorto, nek enkonduki en la vorton fremdajn ideojn ne entenatajn en la ideo reprezentota*[2].

---

[1] En sia sistemo de derivado S[ro] Couturat uzas jen unu klasadon, jen alian. Tie ĉi, li uzas la klasadon Ĉefeĉan ; alifoje li uzas sian propran klasadon (radikoj verbaj kaj radikoj nomaj); fine per sia regulo « adjektivo substantivigita montras personon » li uzas la klasadon Boirac, ĉar sen tiu klasado oni ne povas scii kiuj radikoj estas « adjektivaj ». Se S[ro] C. uzus nur unu klasadon (Ĉefeĉ aŭ Boirac), li baldaŭ konvinkiĝus, ke reguloj de derivado estas nebezonataj.

[2] Oni ne povas kunigi la du principojn de neceso kaj de sufiĉo en unu solan principon, ĉar multaj ideoj estas esprimeblaj per kunmetita vorto nur *proksimume*. En tiaj okazoj, la principo de neceso kaj tiu de sufiĉo liveras du proksimumajn solvojn (unu troan, unu maltroan) inter kiuj troviĝas la ideo esprimota, ekz. : *kron-i* kaj *kron-izi*. Oni tamen devas preferi la pli simplan solvon *(kroni)* pro la ĝenerala principo de malplej penado, kaj pro tio ke tiu solvo estas unusenca, dum la solvo *kronizi* povas havi du malsamajn sencojn.

WIEN

3. Principo de nevariebleco kaj nedependeco de la vortelementoj : *En iu a n kunmetita vorto la diversaj vortelementoj estas nedependaj unu de la alia ; ĉiu elemento havas sian propran valoron kaj nevarieblan signifon.*

Sekve se iu vortelemento entenas en si mem ideon propre « abstraktan », tiu vortelemento ĉiam konservos valoron abstraktan ; do, tian vortelementon oni povas normale konkretigi nur per aldono de alia elemento enhavanta ideon « konkretan ». Ekzemple, se oni aljuĝas al radiko *grand* valoron abstraktan, tiam *grando* signifos « abstrakto grand » (proksimume « eco grand »), kaj « konkretaĵo grand » estos tradukata per *grandaĵo*. Tie ĉi la ideo konkreta estas enkondukita per la ĝenerala sufikso *aĵ*; sed se oni volas plipreciziĝi la konkretaĵon kaj paroli ekzemple pri « persono grand », oni uzos la sufikson *ul*, kiu estas malpli ĝenerala, ĉar ĝi rilatas nur al « konkretaĵoj *vivaj* », kaj oni diros *grandulo*.

Por multaj vortelementoj oni tuj vidas, ĉu ili havas valoron abstraktan aŭ valoron konkretan ; ekz. *hom*, *tabl*, ktp., enhavas en si mem ideon konkretan. Tamen por multaj aliaj vortelementoj la valoro (abstrakta aŭ konkreta) povas esti fiksata nur per arbitra klasado; ekz. radiko *acid* povas esti klasata kiel konkreta aŭ kiel abstrakta. Se oni klasas *acid* inter la konkretaj ideoj (aĵoj), tiam *acido* signifos « aĵo acida », kaj la « abstrakto *acid* » estos *acideco* (aŭ *acidado*), tial ke la sufiksoj *ec* kaj *ad* havas valoron abstraktigan (*ec* = abstrakto adjektiva, *ad* = abstrakto verba).

Alia ekzemplo : se oni klasas radikon *bros* kiel konkretan, *broso* signifos « aĵo, ilo por brosi », kaj la « ago *bros* » estos *brosado*, ĉar la sufikso *ad* enkondukas en la vorton ideon verban, do agan. Kontraŭe, se oni klasus *bros* inter la radikon abstraktan, *broso* signifus « abstrakto *bros* », « ago *bros* », ĉar « ago » estas ideo abstrakta (estaĵo idea); tiam la « ilo por brosi » estus *brosilo*. Se oni akceptas la unuan klasadon, *brosejo* signifos « loko karakterizata per brosoj » (ekz. brosvendejo); se oni akceptas la duan, *brosejo* signifos « loko kie oni brosas ».

Oni vidas do, ke la klasado de la vortelementoj en du kategoriojn (abstrakta kaj konkreta) estas **necesa** por precize fiksi la sencon de ĉiuj vortoj. Ĉu ĝi estas **sufiĉa**?

En la plej multaj okazoj la klasado de la radikoj laŭ tiuj kategorioj sufiĉas. Tamen ne ĉiam : se oni klasas ekzemple la radikon *Franc* kiel konkretan, la senco de la vorto *Franco* estas ne ankoraŭ preciza, ĉar ĝi povas signifi ĉu « homo Franca », ĉu « lando Franca ». Por tiaj vortoj oni devas subdividi la kategorion de la estaĵoj konkretaj en : « estaĵoj nevivaj » (pli speciale *aĵoj)* kaj « estaĵoj vivaj » *(uloj)*. Se oni metas nun la radikon *Franc* sub la ideo *ul*, la vorto *Franco* signifos « homo Franca », kaj la « lando Franca » estos *Francejo* (aŭ *Francujo)*; kontraŭe, se oni metus la radikon *Franc* sub la ideo *aĵ*, la vorto *Franco* signifos « aĵo, lando Franca », kaj « homo Franca » estos tradukata per *Franculo*, aŭ pli bone *Francano*.

Ankaŭ en la kategorio de la « abstraktaĵoj » (estaĵoj ideaj) povas okazi kelkafoje dubo pri la preciza senco de la vorto, ĉar kiam vorto el tiu kategorio montras « ago », oni ne ĉiam scias, ĉu la ago estas *tranzitiva* (igo) aŭ *netranzitiva* (iĝo). Ekzemple se la radiko *turn* havas sencon tranzitivan, tiam la netranzitiva ago estos *turniĝo*; kontraŭe se *turn* havas sencon netranzitivan, tiam la tranzitiva ago estos *turnigo*.

Konklude : por precize fiksi la sencon de ĉiuj vortoj, **necesas kaj sufiĉas** apartigi ilin laŭ du kategorioj (konkreta kaj abstrakta), kondiĉe ke por kelkaj vortelementoj oni subdividu tiujn du kategoriojn jene :

Grupo 1.
**Ideoj konkretaj**
**(aĵoj, uloj,** ktp.)

*acid, angul, ant, ark, arm, arogant, at, avar, ĉast, cirkuler, damask, dezert, eben, er, estr*, ktp.

Subgrupo A.
*Personoj*
**uloj**

*Angl, Belg, Bulgar, Dan, Franc, German, Hispan. Ĥin, Ital, Japan*, ktp.

Subgrupo B.
*Kozoj*
**aĵoj**

*Afrik, Alĝeri, Amerik, Aŭstrali, Aŭstri, Azi, Brazil, Ĉil, Egipt, Holand*, ktp.

Grupo 2.
**Ideoj abstraktaj**
**(ecoj. adoj,** ktp.)

*a, aĉet, ad, afabl, agrabl, akr, ali. alt, ampleks, antikv, apart, apud, arbitr, avid, bel, blank, blind, blond, blu, bon*, ktp.

Subgrupo A.
*Agoj tranzitivaj*
**igoj**

*agac, agord; akcel, amuz, asekur, balanc, ĉagren, degrad, difekt, distr, dolor, ekscit*, ktp.

Subgrupo B.
*Agoj netranzitivaj*
**iĝoj**

*ban, bol, brul, degel, dron, eksplod, ekzerc, ekzil, embaras, enu*, ktp.

*Neklaseblaj aŭ neŭtralaj elementoj: o, aĉ, eg, et, um.* Tiuj elementoj estas neklaseblaj, ĉar per si mem ili havas valoron nek konkretigan nek abstraktigan. Sekve, enkondukante unu el tiuj elementoj en vorton, la klaso de tiu vorto restas la sama, kiel ĝi estis antaŭe. Ekz. *hom-o* montras konkretaĵon, ĉar *hom* estas ideo konkreta; *grand-o* montras abstraktaĵon, ĉar radiko *grand* estas klasata kiel abstrakta (do per si mem la finaĵo *o* estas nek konkreta, nek abstrakta; ĝi montras nur « estaĵo »). Simile la sufiksoj *aĉ, et, eg, um* estas nek konkretaj nek abstraktaj. Ekzemple : *rido* esprimas « agon » (ideon abstraktan), do ankaŭ *ridaĉo; forko* esprimas « objekton » (ideon konkretan) do ankaŭ *forkego*, ktp.

*Pri la participaj sufiksoj :* En Esperanto, la participaj sufiksoj *ant, int, ont, at, it, ot* estas klasataj kiel « konkretaj » (Vidu ĉi supre). Do la kunrespondaj substantivoj montras *ulon* aŭ *aĵon*, laŭ la senco mem de la radiko, al kiu ili estas algluitaj. Ekz. *aĉetanto* montras personon, ĉar nur personoj povas « aĉeti ». Kiam ekzistas dubo, ĉu la participa substantivo montras personon aŭ objekton, oni devas preferi la objekton, ĉar objekto estas ideo pli ĝenerala ol persono, pro tio ke ĉiuj personoj estas objektoj, sed ne ĉiuj objektoj estas personoj. Ekzemple : *amanto* povas rilati nur al personoj; kontraŭe *amato* povas esti persono aŭ objekto, do *amato* signifos « objekto amata », kaj « persono amata » estos *amatulo*, laŭ principoj de sufiĉo kaj de neceso. Tamen se la ideo de persono estas jam esprimita en la kunteksto, oni povos diri *amato* anstataŭ *amatulo*. Ekzemple : *li estas ŝia amato* (kiel en Franca lingvo : *il était son objet aimé*).

*Rimarko :* La ĉi supra klasado de la radikoj ne estas definitiva. Ĝi celas nur montri la manieron apliki la principojn de vortformado. Kiam la Akademio estos aprobinta la teorion mem, tiam venos la tempo decidi pri la definitiva klasado de ĉiu radiko.

4. Principo de renverseblecо : *Se de unu vorto oni derivas serion da aliaj kaj fine alvenas al derivaĵo identa al la origina vorto, oni devas retrovi la originan sencon de l'vorto* (aŭ reciproke : *se oni revenas al la origina senco, oni devas retrovi la originan formon).*

Tiu principo estas rekta konsekvenco de la tri antaŭaj principoj, ĉar la senco de ĉiu ajn vorto konstruita laŭ la principoj de neceso kaj de sufiĉo **dependas nur de la enhavo de l'vorto**, (kondiĉe ke ĉiu vortelemento estu klasata kiel konkreta aŭ kiel abstrakta). Sekve en Esperanto ĉiufoje kiam vorto reprenas la saman formon eksteran, ĝi ankaŭ reprenas la saman signifon. Oni devas nur atenti, ke derivante vorton de alia vorto oni kelkafoje devas anstataŭigi finaĵon gramatikan per ekvivalenta sufikso aŭ reciproke, ĉar vorto ne povas havi pli ol unu gramatika finaĵo; oni do memoru, ke la finaĵo adjektiva *a* esprimas ideon « kvalitigan » *(ec)* aŭ « rilatigan » *(propr) :*

finaĵo *a* = *ec, kvalit,* aŭ *propr, rilatant.*

Simile la finaĵo *i* esprimas la ideon verban *(ad)*, t. e. ideon « agan » aŭ « statan » :

finaĵo *i* = sufikso *ad* = radiko *ag,* aŭ radiko *stat.*

*Ekzemploj de renversebleco :* 1. Lau ĝia enhavo *hom-a* signifas *hom-kvalit;* se oni derivas la substantivon *hom-a-o*, ĝi signifos *hom-kvalit-o* aŭ *hom-ec-o;* se nun oni revenas de la vorto *homeco* al la adjektivo *hom-ec-a*, tiu ĉi lasta reduktiĝas je *hom-a* (ĉar *ec-a* estas nura pleonasmo ĉiufoje kiam finaĵo *a* havas sencon kvalitigan), kaj oni retrovas la originan formon kun la origina senco.

2. *Kron-o* signifas « konkretaĵo *kron* », pro tio ke radiko *kron* estas klasita kiel konkreta. Se de *krono* oni derivas la verbon *kron-i*, tiu vorto signifos « fari la agon karakterizatan per konkretaĵo *kron* ». Se de *kron-i* oni derivas *kron-i-o*, tiu vorto fariĝas *kron-ad-o* (ĉar la finaĵo *i* ne plu estas ĉe fino de l'vorto kaj devas esti anstataŭigata de la sinonima sufikso *ad)* kaj tiu vorto signifas « ago kron ». Se de *kron-ad-o* oni revenas al la verbo *kron-ad-i*, tiu ĉi vorto reduktiĝas je *kron-i* (ĉar *ad-i* estas nura pleonasmo). Fine se de *kron-i* oni revenas al substantivo *kron-o*, la ideo verba *i* tute malaperas, kaj oni retrovas la originan vorton kun la origina senco : *kron-o* = « konkretaĵo *kron* », pro la nevariebleco de la radiko *kron*, kiu estas klasita kiel konkreta.